

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTA ★

N-ro 34, 29. Majo 1921

Jurnalo internacia, universala, sendependa  
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

\* Eliras semajne. \*

## Jam 737 Partoprenontoj por Praha.

Ĉeĥoslovaka Registaro akceptas Protektorecon de la XIII-a Universala Esperanto-Kongreso.  
La Naciaj Esp. Kongresoj dum Pentekosto (vidu p. 2).

### XIII-a Universala Kongreso de Esperanto en Praha.

(31. Julio — 6. Aŭgusto 1921.)

#### IX-a Komunikilo.

S-ino Clara Zamenhof estas invitita de la Loka Kongresa Komitato kiel honora gasto de la XIII-a, d-ro L. Zamenhof, frato de la majstro, aliĝis al la XIII-a.

Honora protektanto de la Kongreso fariĝis ĉeĥoslovaka registaro (ministraro) per sia decido de la 25. 5. 1921.

Subkongreso de Sennaciuloj, aranĝata de Liberiga Stelo sub la honora prezideco de Henri Barbuse. Informoj ĉe „Liberiga Stelo“, Paris XX, rue Boyer 23.

Fakaj kunvenoj. — Adresoj de la organizantoj: arkitektoj s-o Gémont, Moulins, 11 place de la République, ĉastemuloj s-o Roskes, Hago, v. Loost. 68, fervojistoj f-ino Dlouha, Praha, Wilsonovo n., filatelistoj s-o Fleischer, Praha IV, Na valech 278, framasonoj s-o Faulhaber, Amsterdam, Bergerstr. 103, hebreaĵnaciuloj s-o Heller, Litomerice (Ĉeĥosl.), instruistoj f-ino Supichova, Praha II, Mala Stepanska 6, ĵurnalistoj-verkistoj s-o Weiner, Praha, Tribuna, katolikoj s-o Zelenka, Praha-Liboc 113, komercistoj s-o d-ro Unger, Zürich 6104, kristanoj s-o Tutsch, Praha II, YMCA, kuracistoj MUDr. Bischiĵky, Praha I, Mikulašska 12, liberpensuloj s-o Hromada, Praha VII, Socharska 355, anoj de malgrandaj nacioj prof. Fridrich, Brno, Kralovo pole, oficistoj s-o Oberrotman, Warszawa, Krak. Przedm. 10, pacifistoj f-ino Moudra, Praha II, Mala Stepanska 6, poŝtoficistoj f-ino Hemerova, Praha-Karlin, Vitkova 2, psikiŝtoj-spiritualistoj s-o Sklenka, Hradec Kralové, Zivnobanka, ruĝa kruco s-o Kraus, Praha I, Ul. Karoliny Svetle 21, skencistoj d-ro Kamaryt, Bratislava, Telocvična 5, skoltoj s-o Pitlik, Praha III, Nerudova 40, socialistoj s-o Sidlo, Praha VII, Ovinecka 376, studentoj s-o Lukas, Praha II, Jenstejnska 1, ŝakludantoj s-o Hajek, Praha-Nu-16, teosofanoj s-o Cimr, Praha II, Krakovska 17, vegetaranoj s-o Tutsch, Praha, YMCA, virinoj f-ino Nesmerakova, Praha-Vrsovice, Barakova 174.

— La interesojoj pri la fakaj kunvenoj sin turnu rekte al la organizantoj!

Kotizo. — Vidu la VII-an Komunikilon! La kotizoj sendotaj post la 1. junio atingas je 50<sup>o</sup>. Krom la jam en la VII-a kaj VIII-a komunikilo menciitaj pagis la sekvantaj numeroj: 1—4, 6, 7, 9, 52, 55, 48, 49, 57—59, 66, 81, 83, 84, 88, 102, 104, 109, 124, 153, 157, 170, 184, 185, 206—212, 255, 310, 311, 337—340, 346, 349—363, 366—381, 406—426, 428—456, 458—464, 466—474, 481—485, 486—498, 500—507, 510, 511, 513—516, 518—532, 537, 541—543, 556—572, 576—585, 587—602, 604, 607—688, 701—706, 708—716, 720—737. La pagintoj ricevos post la 1. junio la kongreskartojn por uzi ilin ĉe la ĉeĥoslovakaj eksterlandaj kaj enlandaj oficoj.

Aliĝoj. — La nombro de la aliĝintoj atingis 757. La nomoj aperos en venonta numero.

Loĝado. — Vidu la VII-an komunikilon! Oni loĝigos la kongresanojn en hoteloj kaj privataj loĝejoj. Loĝado en komunaj loĝejoj (lernejoj) pro teknikaj kaŭzoj estas neefektivebla.

Studentoj, turnu vin al s-o Weiner, redaktoro de „Tribuna“ en Praha!

Al personoj, kiuj aliĝis post la 15. julio aŭ alvenus ne aliĝinte, oni ne garantias la loĝigadon. Loka Kongresa Komitato ne povas garantii al ĉiu la loĝigon en privata familio. La pli frue aliĝintojn oni preferos. Konatuloj uzu ankaŭ la duan pli malkaran provizoran liron en la sama ĉambro!

Donacoj. — S-o Nemeč 10 kč., s-o Becker 20 mp., lernantoj de f-ino Minarikova 30 k., s-o Aron 18 m., s-o Cesarini 10 l., s-ino Ivanovič 10 k., s-o Kroul 10 k.

Garantia fundo. — 18. S-o Höningsberger 100 k.; 19. s-o Goemans 200 k.; 20. s-o Aron 100 k.; 21. s-o Isbrücker 200 k.; 22. s-o Stratil, 23. s-o Dubny, 24. s-o Degenkamp, 25. s-o Elizondo po 100 k.; 26. s-o Clavenna 300 k. Garantii almenaŭ 100 kč.!

Deponita mono. — S-o Höningsberger 96,56 k.; s-o Goemans 200 k.; s-o Elizondo 100 k.; s-o Cros 25 fr. fk.; f-ino Rybo 8 d. k.

Ĉeĥoslovakaj ambasadorejoj kaj konsulejoj, kiuj devas visi la pasportojn (vidu la VIII-an komunikilon), troviĝas en sekvantaj urboj: Berlin, Hamburg, Dresden, Köln, Chemnitz, Bremen, Breslau, München, Dortmund, Nürnberg, Leipzig, Frankfurt, Wien, Graz, Linz, Bruxelles, Sofia, Köbenhavn, Madrid, Paris, Lyon, London, Oppeln, s' Gravenhage, Roma, Trieste, Milano, Genova, Budapest, Warszawa, Krakow, Bukarest, Galatz, Stockholm, Bern, Zürich, Constantinople, Beograd, Lubjana, Zagreb, Sarajevo, Split, Buenos Aires, Sidney, Rio de Janeiro, Montreal, Alexandria, Washington, Chicago, Pittsburgh, San Francisco, Saint Louis, Bombay, Tokio, Batoum, Vladivostok.

Ĉs. ministerio por eksterlandaj aferoj per sia decido de la 2. aprilo 1921 No. 617/4/21 zprav. ordonis ĉiujn ĉs. eksterlandajn oficojn helpi ĉi-okaze la kongresantojn.

Oni petis rabaton je pasport-visoj. Decido de Ministerio por eksterlandaj aferoj aperos en la X-a komunikilo.

Vojagrabato. — La Loka Kongresa Komitato petis rabaton por la vojaĝo sur la ĉeĥoslovakaj fervojoj. La decido de la fervoj-ministerio aperos en la X-a komunikilo, kiu alportos ankaŭ aliajn gravajn informojn.

Adreso. — Aug. Pitlik, Praha III, Nerudova 40. — Oni respondos nur, se estos aldonitaj respondokupono aŭ alfranko en neuzita, naciaj poŝtmarkoj!

Por la Loka Kongresa Komitato:  
Augustin Pitlik, ĝenerala sekretario.

### La Komerca kaj Industria Ĉambro de Budapeŝt pri Esperanto.

La Hungara Esperanto Servo ensendis la numeron de ET pri la decido de la Pariza Komerca Ĉambro al la Budapeŝta Komerca kaj Industria Ĉambro kaj ricevis sekvantan respondon, kies enhavo estas certe instrua pro ĉiulandaj propagandistoj:

Budapeŝta  
Komerca kaj Industria  
Ĉambro.

Nro. 3 497.  
1921.

Al la est. Gvidantaro  
de la Hungara Esperanta Servo

Budapeŝt.

Respondante al via alvoko de la 12-a de marto, en kiu vi petas nian ĉambron, ke ni helpu la enkondukon de la lingvo Esperanto en la komercajn lernejojn, ni havas la honoron al vi sekvante respondi:

Kontraŭ la ekzemplo menciita de vi, la pariza komerca ĉambro, kiu mem subtenas komercajn lernejojn, do kiu havas ankaŭ la rajton influu la instruprogramon de tiuj, ni ne havas fian lernejojn; tial, kvankam subskribinta ĉambro interesiĝas plej varme por ĉio, kio intencas pliriĝi nian ekonomian vivon, do ankaŭ por la disvastiĝo de la lingvo Esperanto, devis tamen limigi sian agadon al tio, ke ĝi furnis sin al la direktoraroj de la en unua vico atentotaj budapeŝtaj faklernejoj, kaj per ili ĝi demandis la opajn instruistarojn, kio estas ilia opinio pri enkonduko de la lingvo Esperanto.

La alvenintaj fakopinioj, kvankam ĉiuj principe ne retiriĝas rekonu la avantaĝojn de internacia artefarita lingvo, grandparte parolas kontraŭ la enkonduko de la lingvo Esperanto. Ili klarigas, ke

a) la lernanto estas jam tiom ŝargita per la multeco de la devigaĵoj kaj fakultativaj lernobjektoj, ke la enkonduko de nova lernobjekto ne ŝajnas konsilinda;

b) la lernantoj de lingvoj, se ili estas ankoraŭ malproksime de la perfekteco, per kunligo de la lernado de Esperanto facile intermiksus la lernotajn regulojn;

c) Esperanto ne atingis ankoraŭ tiun ŝtupon de la evoluo, ke ĝi estus instruibla en la lernejoj. Nur post funda scio de ia latina aŭ germana lingvo kaj ties vortrezoro ĝi estas facile lernebla. La komerca lernejo por instruado de la franca kaj germana lingvoj donas la eblecon al ĉiuj lernantoj, ke ili post fino de siaj lernadoj facile studu la lingvon Esperanto.

Kontraŭ tiuj ĉi negativaj opinioj ni ne opinias superflue menci pri via afero la sekvanton:

La supera komerca lernejo de la VII-a distrikto en la Kertészstrato estas preta subteni la provan enkondukon de la instruado de la lingvo Esperanto, kiel fakultativa studobjekto, en la komercajn lernejojn, kondiĉe, ke la instruado estus por la lernantoj senpaga. La opinio de la instruistaro de nomita lernejo estas, ke en publikaj lernejoj ĉia ŝajne negoca, per la lernantaro pagata kurso estas parte tute sensukcesa, parte malbonefika al la lerneja disciplino.

Bonvolu do laŭ tio interrilati kun la direktoraro de nomita lernejo.

Fine subskribinta ĉambro ne opinias superflue sciigi vin ankaŭ pri grava rimarko de ĉefurba komerca komercdirektoro:

„La entuziasmaj adeptoj de la lingvo Esperanto serĉu antaŭ ĉio adeptojn ankaŭ inter la profesoro de la ekonomiaj lernejoj, ĉar ja estas strange, ke en la lernejo sub mia gvidado — el la profesoro konsistanta el kvardek personoj — ne estas eĉ unu, kiu nur iam estus sin okupinta pli profunde pri Esperanto. La lernejo estas tia, kia estas ĝia instruisto. Do ankaŭ la lingvo Esperanto tiam havos certan lokon en la lernejo, se ĝi unue akiris la instruistaron.“

La enmetitan numeron de Esperanto (estis la „Triumfonta“) ni sube resendas.

Budapeŝt, la 19-an de aprilo 1921.

LA BUDAPEŝTA KOMERCA KAJ INDUSTRIAL  
ĈAMBRO

Subskribis:

Szávay,  
ĉefsekretario.

Belatiny,  
prezidanto.

Interesaĵo estas la kontraŭopinioj fakaj; kvankam ili konfesas, ke ili preskaŭ ne konas Esperanton, ĉu do ilia fakopinio valoras ion? Oni povas ilin facile refuti! Cetere delegite de la Hungarlanda Esp. Societo, s-oj prof. Michalik kaj d-ro Mezei vizitis la ĉefsekretaron de la Ĉambro, ĉar ĝi laŭ la letero ja volonte helpas nian movadon. Li ankaŭ promesis moralan helpon, kaj eble oni donos ĉambrojn por instrui komercierajn profesorojn. Tion efektiviĝi estas nun la klopodo de budapeŝtanoj. Ĝis nun la ĉambro ja estis ĉiam rifuzema al Esperanto! Tamen estus bone, se aliaj ĉambroj, kie esperantistoj havas influon, kaj Esperanto-societoj kaj -institutoj el aliaj landoj skribus al la budapeŝta ĉambro refutante ankaŭ la kontraŭpunktojn kaj instigante enkonduki la lingvon en la komercan! Kelkaj tiaj skribaĵoj bone efektus! Se nur malrapide, tamen ni antaŭeniras al la tempo, kiam oni serioze parolos pri Esperanto!

# Pentekosto Esperantista ★ Bone sukcesintaj Naciaj Kongresoj.

Kion oni vidis aŭ kion oni nun aŭdas pri la pentekostaj kongresoj, tio estas nepre ĝoŝiga. Unuan detalan raporton ni ricevis pri la kongreso de niaj francaj samideanoj en Orléans. Ni tre dankas al nia franca korespondanto pro la rapida plenumo de nia deziro, havigi al ni plejble baldaŭ aŭtentikajn sciigojn pri la kongreso.

La raporto pri la germana kongreso en Essen bedaŭrinde alvenis nur parte, tiel ke la finon ni povos presi nur en la venonta numero.

El Harrogate ni ricevis belan kongresan manlibron kun preciza programo, kun plano de Harrogate kaj kun ilustraĵoj pri la preĝejo de S-a Luko, kie okazis la esp. diservoj, pri „Vintra Ĝardenoj“ (kongresejo), pri pentrinda urbeto Knarborough apud Harrogate kaj pri Fountains Abbey.

El Liège ni ricevis promeson pri sendo de detala raporto, sed la raporto mem ĝis nun ne alvenis.

Ni deklaras ripete, ke ni raportas ĉiam kun plezuro pri diverslandaj naciaj esp. kongresoj; kompreneble ni povas tion fari nur, se ekzistas bonvolaj partoprenintoj, kiuj sendas al ni siajn raportojn kaj impresojn.

## La Kongreso de Orléans.

La bela kaj frankvila urbo Orléans havas grandan historian esintecon. Renaskiĝinta post la detruo de la urbo Cenabum ribeliginta kontraŭ Romo en jaro 52 antaŭ la naskiĝo de Kristo, ĝi reaparis en la historio tri cent jarojn poste sub la nomo de Aurelianis (Orelanis).

Sieĝita de la hunoj en 451 kaj savita de la episkopo Anianus, dum kelka tempo ĉefurbo de la efemera reglando de Orléans, ĝi fariĝas je la komenco de la XIV-a jarcento, pro la fondaĵo de la Universitato, grava kultura centro, kie instruis la plej granda franca juristo Pothier.

Dum la XV-a jarcento, la anĝoj, majstroj de la Norda Francujo, sieĝas la urbon, kiu estas savita de la nacia heroino Jeanne d'Arc la 29. aprilo 1429. Ĉiujare la 8-an de majo estas festata tiu-ĉi grava historia fakto, kaj nun „La Orleana Virgulino“ estas nacia heroino sanktigita de la Katolika Eklezio. Dum la religiaj militoj parto de la urbo estas detruita kaj la duko de Guise, sieĝanto de la urbo, estas mortigita en 1565 en ĝiaj ĉirkaŭaĵoj.

Post tiu ĉi jarcento la vivo de la urbo fariĝas pli frankvila, ĝi komencas kreski kaj nun ĝia loĝantaro nombrigas je 80.000. Sur ĉiu paŝo oni vidas la restaĵojn de ĝia glora pasinteco: la domon de Jeanne d'Arc, la belan katedralon de Saint-Croix, la turon de Beffroi (Befrua), la salomon de tejoj de la malnova Universitato, la malnovan Intendantejon kaj multajn aliajn monumentojn.

Malgraŭ la mallonga preparado, la Orleana grupo meritas dankojn pro ĝia laboro: ĝia prezidanto s-ro de Massy, prezidanto de la Civila Tribunalo, kiu sukcesis ricevi la honoran prezidantecon de la urbestro kaj de la prezidanto de la komerca ĉambro, la nelacigebla s-ino Magnus-Focke, la sekretario s-o Leroy, la kassisto s-o Martin kaj ĉiuj aliaj.

Dimanĉon matene komencis alveni la samideanoj, atendataj je la stacidomo. En la akceptejo 50, rue Jeanne d'Arc, ĉiuj informoj pri hoteloj estis donataj al ili, same kiel bultenoj kaj ET.

## La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korotenko.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio.

Tradukis laŭ la 5-a Rusa eldono kun permeso de la aŭtoro

Maria Sidlovskaja.

(25-a daŭrigo.)

„All right!“ ekaŭdiĝis aprobaj krioj en la grupo de la irlandanoj, kaj Paddy, kontenta, jam suriris sian jakon. En la sama momento Mateo peze sin levis el post la lito...

Li estis nerekoncible: liaj ĉiam mildaj okuloj nun aspektis sovaĝe, la haroj hirtiĝis, la dentoj grincis, kaj li ĉirkaŭvigiĝis la rigardojn, serĉante, kion preni en la manon...

La irlandanoj entiris Paddy-on en sian rondon kaj malfrankvile kunarigis kiel brutaro, vidanta urson. Ili ĉiuj kun miro kaj timo observis ĉi tiun grandegan viron, atendante ion teruran, tiom pli ke Dima ankaŭ aspektis pala kaj timigita...

Malfacile estas diri, kio okazus poste, sed en la sama momento Anna alkuris al Mateo kaj kaptis lian manon.

„Pro Dio!“ ŝi nur diris: „ho, pro Dio!“

Mateo alrigardis ŝin komence per malklara, nenion komprenanta rigardo, sed post kelkaj momentoj li malfacile ekspiregis, poste li sin forturnis kaj sidigis ĉe fenestro.

La irlandanoj kvietiĝis. Paddy eĉ eldiris la intencon aliri Mateon por premi lian manon, sed Dima lin haltigis, kaj oni laŭsis Mateon en paco.

La nombro de kongresanoj estis ĉirkaŭ cent. Ili estus ankoraŭ pli nombraj, sed la Pariza Foiro retenis multajn fervorajn parizanojn. Inter la kongresanoj ni rimarku: generalon Bastien el Strasbourg, s-on de Rienz, inspektoron de poŝtoj kaj telegrafoj en Paris, profesoron de Lille'a Universitato kaj membron de la Medicina Akademio d-ron Vanvert, kanonikon Chapeau, konsilanton de Pariza Apelacia Tribunalo Eyquem, la konatan pioniron de sporto Archdeacon, du rusojn kaj japanojn. Kelkaj samideanoj faris longan vojaĝon veninte el Marseille, Bordeaux, Periguan kaj Metz.

Post amika tagmanĝo, je la 2-a horo estis malfarmata kunveno en la granda salono de l' Institutu, kies antaŭĉambro enhavis belan ekspozicion. La prezidanto estis Rollet de l'Isle, direktoro de la hidrografia fako en la Mara Ministerio kaj prezidanto de la S.F.p.P.E. Li salutis la alvenintojn, kaj ĉiuj honoris per levigo la memoron de nia Majstro kaj de ĉiuj francaj samideanoj mortintaj sur la batalokampo. Multe da salutleteroj el Francujo aŭ telegramoj estis legataj per s-o Leroy (inter ili kortuŝa letero de tri rusaj soldatoj el la Fremda Legio en Maroko), de la grupo en Gevle (Svedujo), de Stroboli el Romo, de E. Privat, de „Esperanto Triumfonta“ kaj de Oakland (Kalifornio).

En la raporto pri la agado s-o Rollet de l'Isle parolis precipe pri la Pariza Komerca Ĉambro, pri la rezolucio de 21 akademianoj, pri la nuna agado apud la grava kleriga „Ligo de Instruado“ (Ligue d'Enseignement), pri la agado inter la studentaj asocioj kaj pri la parlamenta esp. grupo.

La vicprezidanto prof. Cart alvokis pri unuigo ĉirkaŭ la nacia societo, kiu de 4 monatoj havas jam 20 realigitajn grupojn.

Aliaj pridiskutataj demandoj estis tiuj de nacia adreso, de financa stato kaj de propagando. La urbo de la venonta kongreso estas provizore Béziers.

Je la 5-a okazis kunveno de 14 esp. membroj de la Franca Turing-Club sub la prezido de s-o Eyquem. Tiu-ĉi grava asocio, post la morto de Carlo Bourlet, forlasis la subtenon de Esperanto, sed lastajare, dank' al la klopodoj de s-o Archdeacon formiĝis esp. sekcio kun 100 membroj, sub la prezido de la konata pioniro de aviado, kolonelo Renard, membro de Administra Konsilantaro de T.-C.

Vespere okazis en Hotelo de Sankta Catherine bankedo tre vigla kaj gaja.

La reprezentado okazinta je 8.30 h. en la Institutu estis vera pruvo de viveco de Esperanto. La parizaj esp. amatoroj alportis kun ili sur la scenejon sian junecon, gajecon kaj ŝprucantan spritecon, kaj la ĉarmaj fraŭlinoj sian elegantecon kaj graciecon. La kantoj de s-o Le Cornec kaj de s-ino Langlet, la deklamo de f-ino Gaillot, du komedietoj en Esperanto: „La sinjoro, kiu perdis la poŝhorloĝon“ kaj „La angla lingvo sen profesoro“, la kantitaĵ kaj deklamitaĵ spritaĵoj de s-o Schwartz kaj f-ino Marga Rincta el la esp. kabaredo „Verda Kato“ ĉarmis la aŭskultantojn kaj elvokis rideton eĉ sur la gravaj vizaĝoj de niaj eminentuloj.

Lunde matene okazis kunveno de UEA sub la prezido de s-o Delanoue ĉeestita de 50 membroj, dum kiu s-o Poncet el Lyon prezentis interesan raporton pri la teritoria organizo kaj estis diskutataj diversaj demandoj. Samtempe okazis ekzamenoj gvidataj de s-o Cart.

Agrabla kaj gaja tagmanĝo en Olivet apud Orléans, en pitoreska ĉirkaŭaĵo, je kiu lokaj journalistoj estis invitataj, kun toaŝtoj de Eyquem, de

Massy, Rollet de l'Isle kaj Cart, finis la kongreson, kies rezultatoj superis ĉiujn esperojn de Orleanaj samideanoj.

— Samtempe okazis en Labora Borso de Orléans franca kongreso de esp. laboristoj. Estis decidite fondi federacion de esp. revolucianoj en franclingvaj landoj kaj komplete separigi de la neŭtrala esp. movado. A/o.

## La Kongreso de Essen.

La Ruhr-regiono havos okupacion — ĉu okupacio malhelpos la germanan kongreson? — en Köln okazis granda ligotago malgraŭ okupacio — sed ĉu la francoj? — eble jam tre frua fermo de restoracioj kaj kunvenejoj — ĉi estis la enhavo de kartoj, leteroj kaj telegramoj, kiuj iris kaj reiris orienten, okcidenten, norden kaj suden tra tuta Germanlando. Neniam jam antaŭe tiom da esperantistoj tiel atente tralegis la gazetojn, neniam ili tiel fervore okupis sin pri politiko kiel en la tempo de l' transdonado de la Entente'a ultimato al Germanujo.

Fine, fine oni ricevis certigon: la francoj ne enmarŝos, ne okupos niajn loĝejojn, ne pretendos niajn kunvenejoj, ne malhelpos niajn laboroj aŭ festoj ĝis la kufima polica horo aŭ eĉ pli longe. Kaj — Essen estis okupata de germanaj gesamideanoj, kiuj lastminute post klarigo de la politika ĉielo sekvis la jamdelongan pentekostan kutimon de vojaĝo al Germana Esperanto-Kongreso.

Jam antaŭ la milito la esperantistoj el okcidenta Germanlando postulis germanan kongreson por sia regiono, sed vane. Ĉiam iaj kaŭzoj devigis GEA-on elekti alian urbon. Post la milito la reĝno-vestfaliaj samideanoj estis inter la unuaj, kiuj komencis energian laboron, kaj plenfide GEA sekvis la inviton al Essen. Ĉi tiu fido pliiĝis, postkiam oni en tuta Germanujo povis vidi la progresojn de Esperanto en Revelujo. La „antaŭ-kongreso“ (Ligotago de Revelo) en Köln jam sukcesis en grado, ke neniu plu dubis pri simila sukceso de Essen'a kongreso. Jes, sukceso, vera sukceso ĝi estis en ĉiu rilato. Sukceso des pli rimarkinda, ĉar precipe en la lastaj semajnoj la politika situacio peze premis la kongresemulojn kaj la aranĝintojn.

Plena je gaja espero mi alvenis sabaton posttagmeze en Essen. Jam ĉe la peron-kontrolo salutis nin aŭŝo pri la kongreso. Antaŭ la stacidomo la saluto fariĝas pli energia. „Esperanto-kongrreso! Kongrreso numero!“ kriis maljuna, dika gazetvendistino ornamita per kelkaj Esperanto-flagetoj. Kompreneble mi aĉetis la specialan numeron de ET. Do, escepte ne-ĉarmulino en la unua vico! Tamen ŝi venkis! — Ĉu venkis ŝi? aŭ ĉu la Esperanta ideo denove ekkaptis nian tuton?

Ni iris en la akceptejon, kie por ni oficiale komencis la kongreso. Kaj jen ankaŭ la oficiala kongres-ĉarmulino. Ĉu mi ŝin nomu? Jes, sed nur por averti la multajn samideanojn kiuj jam perdis sian koron al ŝi. Cio estas vana! Ĉu ne, fraŭlino Goedeke?

Supra etaĝo de „Handelshof“. En la kafejo jam sidas la „kanonoj“ de nia germana movado, de multaj jaroj regulaj kongresanoj. Unu post la alia ili venis el Berlin, Braunschweig, Breslau, Dresden, Graz, Hamburg, Kiel, Köln, Leipzig, Lübeck, Stuttgart, Wismar ktp. Baldaŭ ili iris al „Städtischer Saalbau“ (Urba Salonaro), kie en la „Krupp-Saal“ estis la unua oficiala kunveno. Kora persona saluto de novaj kaj malnovaj sam-

Subite li terurite ekhaltis en la lito. Mateo estis sidanta. En la lumo, venanta tra la fenestro, lia vizaĝo aspektis pala, la haroj hirtaj, la okuloj brilantaj, li levis la manon supren.

„Aŭskultu, Dima, kion diras al vi Mateo Lozinski! Tondro trafu viajn kamaradojn kune kun tiu sentaŭgulo Tammany-Hall aŭ kiel ĝi tie estas nomata! Tondro trafu ĉi tiun malbenindan urbon kaj la urbestron, kiun vi elektis! Tondro trafu ankaŭ ilian kupran liberecon, tie, sur la insulo... Ke la diabloj prenu ilin ĉiujn kune kun tiuj, kiuj vendas al ili sian animon...“

„Mallaŭte, mi petas, Mateo, mallaŭte,“ penis Dima lin kvietigi. „Oni dormas, oni ĉi tie ne ŝatas bruon dumnoktan...“

Sed Mateo ne ĉesis ĝis li finis. Efektive, la irlandanoj jam elsaltis el la litoj, oni ekbruligis la gason, kaj ĉiuj konsternite rigardis al la furiozanta Loziŝcano.

„Rigardu aŭ ne rigardu, vi ĉiuj, sed mi diras la veron!“ li fine kriis, sin turnante al ili kaj minacante per pugno; poste li tuj falis en la liton.

La amerikanoj malfrankvile interkonsiliĝis, poste alvokis Dima'n kaj demandis lin, ĉu lia amiko ne estas freneza, kaj ĉu ne estas danĝere lasi lin ĉi tie pasigi la nokton. Dima frankvile ilin: nun Mateo dormos kaj nenion faros kontraŭ ili. Li estas homo bona, sed ne klera, kaj nun ili ne devas lin tuŝi en la daŭro de du, tri tagoj...

Tiam la amerikanoj ree enlitiĝis, ĉiam observante Mateon. Oni estingis la lumon, kaj en la ĉambro de Mr. Bork ekregis silento. Sed la sirataj lumoj lumis ne klare, do oni ne povis vidi, kiu dormas, kiu maldormas en la loĝejo de Mr. Bork.

(Daŭrigita.)



Ideanoj prokrastis la oficialan malfermon ĝis post la 8-a, kiam la prezidanto de la Essen'a loka grupo de GEA, s-o Reuss, povis korege saluti la alvenintojn. Deklamoj, pian-ludo de fino Tettborn kaj komunaj kantoj kunigis lin ĝis la 11 1/2-a.

Dimanĉon matene. Per ĉiuj vagonaroj alvenis novaj gesamideanoj, kiuj ĝojis povi travivi veran Esperantistan Pentekoston. Post katolika diservo kun predikado de d-ro Mepser ĝis Graz en preĝejo de S-a Jozefo ili rapidas en la „Krupp-Saal“ por ĉeesti la solenan malfermon. Reprezentantoj de diversaj estraroj, gesamideanoj kaj interesuloj plenigas la vastan ĉambregon, kiam d-ro Steche, nia senlaca germana pioniro kaj prezidanto de GEA per varmaj vortoj salutis la gastaron kaj dankis la reprezentantojn de estraroj kaj oficialej institucioj kaj de la gazetaro pro ilia veno kaj por la intereso, kiun ili montris por nia afero, kiun ni precipe kiel bonaj germanoj, per ĉiuj fortoj devas subteni.

Multaj saluttelegramoj kaj leteroj alvenis el ĉiuj partoj de German- kaj eksterlando.

Kiel unua la ĉefurbestro igis saluti la kongreson. La parolanto esprimis sian specialan ĝojon, ke tiom da personoj venis por vidi, ke la Krupp-urbo estas urbo ne nur de fabrikoj kaj fumantaj kamentuboj, sed ankaŭ de belaj parkoj, domoj, stratoj kaj de ĉarma ĉirkaŭaĵo, kaj deziris plenan sukceson al la kongreso.

En sia fiesparolado „Esperanto — nacia postulo“ d-ro Steche esprimis la ideon, ke ni germanoj devas antaŭenpuŝi Esperanton responde al la postulo de la franca registaro, kiu en la Ligo de Popoloj pretendas francan lingvon kiel internacian, kaj due por ne resti post la angloj, kiuj tre fervore subtenas Esperanton, ĉar ili jam delonge konvinkigis, ke neniu popolo akceptus alian nacian lingvon kiel internacian interkomprenilon. Per varmaj vortoj li ankaŭ pensis niajn aŭstriajn samideanojn kaj sendis al ili siajn plej korajn salutojn. (Finota.)

## Opavendado de ET.

Novaj aĉetejoj (vidu ET n-on 52):

**Francio.**

Strasburgo (librejo Singer, rue de la Mésange).

**Germanio.**

Freiburg 1. Br. (kiosko Tritschler).

**Polio.**

Warszawa (gazetistoj ĉe Marszałkowska 101, Wierzbowa 11 kaj Esp. Oficejo Wielka 41, telefono 289-60).

**Rumanio.**

Timișoara-Temesvar (aranĝas s-o Fr. Engelmann, sekr. de Foncière, asekura instituto).

La opavendado evoluas kontinente. Lokoj, kiuj komencis vendi 5-10 ekz., nun vendas 20, 30 kaj pli ekz. ĉiusemajne, ekzemple Budapeŝt vendas po 60 ekz., Warszawa, Lodz kaj Reichenberg 50, Bilbao 40, Barcelona, Rotterdam, Targul Mureș, Miskolc 30, Girona, Milano, Bromberg, Kaunas-Kovno 25, Zürich 20, ktp.

Bedaŭrinde en kelkaj lokoj la opavendado malsukcesis pro ne sufiĉa intereso. Sed tio ne povas malkuraĝigi nin, ĉar aliloke ĝi funkcias tiom pli bone. „Iom post iom“, kiel ni jam diris en nia 2-a numero, ET enkondukigas kiel vera ĵurnalo esperantista, iom post iom ĝi fosas sian sulkon, iom post iom ĝi asimiligas al naciaj ĵurnaloj. Ni ne haltu!

## Esperanto Postkongreso kaj IV-a Hungarlanda Kongreso en Budapeŝt (9.-10. Augusto 1921).

**Kotizajo:** La duono de la kotizajo de Praha por iliaj rilataj landoj. Ĉiun monsendon oni adresu al: **Magyar Olasz Bank fiókja, VII, Kiraly u. 57 sz. Esperanto Kongressus alap.**

**Sekretario kaj adreso:** Aleksandro Laquer, Budepeŝt VI, Kiraly u. 57, II.

**Kongresa organiza komitato:**

Prezidantoj: D-ro Leono Lorand kaj Mihaelo Zsamboky.

Kasisto: Georgo Toth.  
Kontrolantoj: Elek Toinai, Stefano Roboz.  
Amuza komitato: Julio Baghy, Johano Thoman.  
Ekspozicia komitato: Julio Kethly, IX Ferencz-ter I, Munkas-Othton.

(Oni sendu ekspoziciaĵojn!)

**Akcepta komitato:** Frigyes Kürschner, VIII, Örmö-völgy u. 10a-1-11 kaj Laboristaj Esperantistoj, IX Ferencz-ter I, Munkas-Othton.

**Provizora programo:**

Lunde, la 8-an vesp.: konatiĝa vesperkunveno en kafejo elektota.

Marde, la 9-an atm.: renkontiĝo en kafejo elektota, malferma festkunveno, promonado tra la mezo de la urbo;

ptm.: komuna tagmanĝo, fak-kunidoj, general-kunidoj, nur por fremduloj; promonadoj, ŝip-ekskurso;

vesp.: koncerto kaj kabaredo.

Merkrede, la 10-an atm.: renkontiĝo en kafejo, kunidoj, promonado kaj komuna rondveturado per tramvojoj;

ptm.: ferma kunido, ekskurso al Buda; vesp.: teatra prezentado.

Ĵaŭrde, la 11-an: laŭvole komuna forvojaĝo al Graz, al Italujo kaj samvoje vizitado de la lago Balaton.

**Vojaĝkostoj:** de Praha ĝis Budepeŝt laŭ oficiala sciigo el Praha II-a klaso 168 kĉ. kaj 106 kĉ, III-a klaso 84 kĉ. kaj 75 kĉ.

**Vivkostoj en Budepeŝt:**

Loĝejo en hotelo proksimume 100 k.  
matenmanĝo 15 k. — 20 k.  
tagmanĝo 30 k. — 70 k.  
vespermanĝo 30 k. — 70 k.  
Teatra bileto proksimume 25 k., tramvoja kaj ŝipvetura bileto proksimume 30 k.

**Samideanoj.** Anoncu vin jam nun, por ke ni povu ĉion antaŭe prepari. Kiuj volas, ke ni zorgu pri loĝejoj antaŭe, mendu jam laŭeble nun. Ni esperas aranĝi interesan kaj grandan landan kongreson, do venu ĉiuj, por helpi la hungarlandan propagandon.

La organiza komitato.

## Mallongaj Esp. Sciigoj.

**Profito de 5000 fl. por la militinvalidoj rezultis el koncerto de Romilly Boys' Choir.**

La esp. „Romilly Boys' Choir“ el Barry kantis en Antverpeno la 17-an de majo, antaŭ 1600 personoj en la Reĝa Franca Teatro. Dum la koncerto estis uzataj 5 lingvoj: flandra, franca, angla, kimra kaj esperanta. — Pleninteresa estis la prezentado en Esperanto de la teatraĵeto „Bietje“ (de profesiaj artistoj). Ĉeestis la urbestro, la skabeno de instruado, la distrikta generalo, la konsulo de Britujo kaj Portugalujo k. a. — La urbestro subtenis la aferon aĉetante lokon por 500 lernantoj de la urbaj lernejoj. — La profito por la militinvalidoj atingas proks. 5000 fl. La koplando estis plenkona, sed la sukceso kaj propagando bonegaj. (A. S.)

**La Skota Esp. Kongreso en Dunfermline** estas prokrastita kaj okazos verŝajne la 18-an de junio nunjara.

**Senpaga Telegrafado pri Esp. Kongreso.**

Okaze de la Sesa Brazilia Esperanto Kongreso (20.—24. aprilo nunjara) la direktoro de la Nacia Telegrafo estis permesinta, ke, dum la monato aprilo, oni telegrafu senpaga pri la kongreso.

**Kongreso de Rusaj Esperantistoj.**

La 1-an de junio oni kunvokas en Petrograd kongreson de tutruslandaj esperantistoj.

**Esp. Kioskoj ĉe Pariza Foiro.**

La redakcio de ET ricevis du fotojn pri esp. kiosko en la pariza foiro, strato de Belartoj, n-o 708, kiujn ĝi ne povas reprodukti sur la malbona gazetpapero. En tiu ĉi kiosko deĵoras fraŭlino Gérard. Alia kiosko estas gvidata de s-o Herlemont, reklama teknikisto. Ĉiutage estas vendataj multe da lernolibroj; multaj pasantoj interesiĝas pri nia lingvo. Krom francaj parizaj kaj eksterurbaj samideanoj jam vizitis rusoj, poloj, angloj kaj hispanoj la kioskojn.

**Fondo de Esperanto-grupo 1800 m super la maro en la almtoraro.**

Pentekoste, kelkaj bulgaraj studentoj kaj samideanoj studentaj tie-ĉi en Graz (Stirio) faris kun mi ekskurson en la „Bärenschütz“, romantika kluso en la siriaj kalkalpoj. Kuniris ankaŭ la fervora bulgara samideano s-ro stud. Grekoff el Sofio, kiu faris la interpretiston. Dumvoje ni multe propagandis nian lingvon, gluante al la rokoj Esperanto-sigelmorkojn, parolante Esperanton ktp., tiel ke la ne-esperantistaj bulgaraj studentoj decidis tuj lerni nian lingvon fondante malgrandan esperantan grupon sub la gvidado de s-ro Grekoff.

Alveninte je la pinto, ni aranĝis nian fandan kunvenon. Oni elektis s-on Grekoff kiel prezidanton, alian bulgaran samideanon kiel sekretaron kaj min kiel konsilanton. La nova bulgara studenta grupo nombras nun 10 membrojn. Ĝi intencas propagandi Esperanton precipe inter la 300 bulgaraj studentoj ĉe la graza universitato. La grupo ankaŭ aliĝos al la Bulgara Esperanto Societo.

Do, nia ekskurso estis sufiĉe fruktodona. 1800 m. super la maro en la belega montaro estiĝis bataltrupo por nia sankta afero. Ĉiam antaŭen! Hanns Sappi, Graz.

**La unua ŝtata ekzameno de esp. instruistoj en Ĉeĥoslovakio**

okazis la 18. aprilo en Praha. Prezidis direktoro Dehmel, d-ro Bischitzky funkcias kiel ekzamena komisario. La ekzameno faris s-roj Wolf el Ladowitz, Storch el Krochwitz kaj f-ino Premyslovsky el Dux. Grava estis la morala efiko ĉe la ekzamena komisiono, el kiu nur la ekzamena komisario estis esperantisto.

**Esp. Grupo inter Ukrainaj Militkaptitoj.**

En la urbo Tarnov (Polio) inter ukrainaj militkaptitoj fondiĝis en februaro esp. grupo, kiu nun havas 25 membrojn. Estas gvidataj du kursoj: ordinara kaj pli grada. (A. K.)

**Komerca Ĉambro kaj Urbestro de Huesca oficiale reprezentotaj ĉe Ibera Esp. Kunveno.**

Okaze de la Dua Ibera Esp. Kunveno, okazonta je la fino de nuna monato en Zaragoza, la komerca ĉambro de la provinco Huesca (kiu de antaŭ du jaroj subtenas esp. kurson) honoris la delegiton de UEA, s-on Rob. Maraury, nomante lin sia oficiala reprezentanto por tiu esp. kunveno. Ankaŭ la urbestro de Huesca (provinca ĉefurbo) aliĝis kaj sendos oficialan reprezentanton, la urbestron mem, s-on Vidal Perera, prof. ĉe Normala Lernejo, kiu parolados publike por Esperanto.

**Esp. Grupo de Rusaj Studentoj en Berlin.**

La 16. majo en Berlin ĉe la Rusa Studenta Asocio en Germanio fondiĝis Studenta Esperanto Rondo (Ster). La rondo havas jam multajn membrojn kaj prosperajn aspektojn por la estonteco. Kiel prezidanto estas elektita nia malnova samideano, s-o V. Markuze, kiel sekretario kaj kasisto s-o M. Fenster. — Adreso: Verein der russischen Studenten, für Studenta Esperanto Rondo (Ster), Charlottenburg-Berlin, Stuttgart'er Platz 20.

## Gazetaro.

**CITTA DE MILANO.** Ĉiuj esperantistoj, kiuj volas, ke la Grava multpaga monata bulleto ilustrata pri ekonomio, administraco kaj statistiko, N-ro 5 de 31. marto 1921, Adreso: Palazzo Marino, Milano (Italia). — Enhavas disaĵon de delata artikolo pri la helpingo Esperanto de F. C. Monti.

**DIE FREIE MEINUNG.** (La libera opinio). Fiskoklara duonmonatulo. Hamburg (Altrahstedt, Vereinsstr. 21), 20. majo 1921. — Kun artikolo pri „Esperanto kaj libera ekonomio“ de prof. Rissom, Hamburg-Bergedorf.

**L'ILLUMINATE.** 6. majo 1921. — La plej grava ĵurnalo de la francaj komunistoj kun eldonombro de 22000 ekz.; represas el „Esperantista Laboristo“ la penson pri Esp. de M. Gorka.

**MAINZER JOURNAL** kaj **MAINZER ANZEIGER**, de 11. majo 1921, enhavas artikolon pri la gastigo de aŭstrijaj kaj germanaj infanoj ĉe eksterlandaj esperantistoj.

**VOLKSZEITUNG**, Bromberg. N-roj de 16, 23, 30. aprilo kaj 14. majo.

Eble neniu nacia gazeto propagandas nian lingvon tiel fervore kiel la socialdemokrata „Volkszeitung“ en Bromberg (Polio); ĉiunmonate enhavas vastan esp. anglulon.

## Tra la Mondo.

La brita Post Master General komunikis, ke depost 13. junio la poŝtarkivo en Britujo estos plialtigata, por poŝtarkivo (en-kaj eksterlando) de 1 al 1 1/2 penco, por leteroj al eksterlando de 2 1/2 al 3 pencoj.

En Leipzig komencis la proceso kontraŭ la milikulpigitoj.

Traktato estas subsignita la 20. majo en Pekino de la rajtigitoj de la germana kaj de la ĉina registaroj. Per ĝi la miliaj statoj inter Germanujo kaj Ĉinujo estas finitaj.

Dum la 2.—5. junio okazos en Breslau (Germ.) la 62. poragrikultura maŝinfoiro. Estas ekspoziciaj agrikulturaj maŝinoj kaj iloj; maŝinoj kaj iloj por fiskapado, arbara ekspluato, gardenkulturo, birdar- kaj abelbredado, casado; artefaritaj sterkaĵoj, semajoj, agrikultur-industriaj instalaĵoj, maŝinkonstruado kaj tekniko; konstrumaterialo; arto kaj armetio, internaj dekoraciaĵoj, buroajoj, sporto. Samideanoj, kiuj intencas viziti la foiron, estas petataj komuniki tion al la Esperanto-fako de la foiro (Breslau, Ohlauerstr. 87).

## Sporto.

**Pentekosta Piedplukado en Praha.**

Dum la ĵus pasinta Pentekosto Praha gastigis la sekvantajn eksterlandajn klubojn piedplukajn: Old Boys Basel (Svislando), Pfeil Nürnberg kaj Viktoria Berlin (Germanio), Maasrichtsche V. V. (Nederlanda), kiuj veturis kun ĉiuj kluboj: A. C. Sparta, S. K. Slavia, S. K. Viktoria Zizkov kaj A. F. K. Vrsovice, kaj kun Deutscher Fussball-Club en Praha.

Jen la rezultatoj: Old Boys Basel kontraŭ S. K. Viktoria Zizkov 2 : 3, kontraŭ S. K. Slavia 2 : 2, kontraŭ A. C. Sparta 0 : 5; Maasrichtsche V. V. kontraŭ S. K. Viktoria Zizkov 0 : 5, kontraŭ D. F. C. 2 : 6, kontraŭ A. F. K. Vrsovice 2 : 6; Viktoria Berlin kontraŭ D. F. C. 5 : 3, kontraŭ A. F. K. 0 : 9, kontraŭ A. F. K. Vrsovice 1 : 4, kontraŭ Viktoria Berlin 0 : 1.

## Al niaj Kunlaborantoj!

La korespondadoj de la redakcio en lasta tempo tiel amasiĝis, ke estas neeble, al ĉiuj respondi tuj. Eĉ restis apenaŭ tempo por ordigi ilin. La redakcio de ET, samtempe eldonanto kaj redaktanto de duonsemajna nacia ĵurnalo, vizitinte dum kvin tagoj la kongreson en Essen kaj nuntempe aranĝante teknikajn ŝanĝojn en la presejo, trovigas momente senkonsila en tiom da laboro. Bedaŭrinde li havas nur unu kapon kaj ne pli ol du brakojn. Li do petas ĉiujn korespondantojn pri pacienco. Antaŭ ĉio nun bonvola ne ĝeni lin per ripetaj demandoj, per plendo pro ne-respondado aŭ per bagatelajoj. Post daŭri semajnoj ĉio denove funkcios regule kaj eĉ pli bone ol antaŭe.

Sendintojn de manuskriptoj ne jam publikita ni certigas, ke ĉiuj manuskriptoj estas bone konservataj; ĉiuj sendinto ricevos respondon pri publikado aŭ eble resp. nepublikado aŭ eble tuj, kiam ĝi estos ebla.

## Parolejo.

(Pro la abundo de interesaj aktuala materialo ni denove devas prokrasti la parolejon pri formato kaj aranĝo de ET. — Red.)

83.

### Rilatas al 70.

Patriotismo kaj internacismo estas ambaŭ bonaj aferoj. Vera patrioto laboras konservi internacian pacon. Interna milito, klasuspekto kaj strikado estas la plej malbonaj formoj de milito. Estas skribite, ke „tiu urbo aŭ domo dividita kontraŭ si mem ne starados“. Ĉe tiaj cirkonstancoj estas tute favora ŝanco kaj oportuna preteksto interveni por restarigi ordon. Sed estas tiu patriotismo (ŝovinismo), kiu iustigas melami aliandanojn.

(Ch. G. St.-M., London.)

84.

Estas tre dezirinde, ke la tradukintoj de artikoloj el „Esp. Triumfonta“, kiuj aperas en iuj nacilingvaj gazetoj, sendu tiujn ekzemplerojn kun tradukaĵoj al tiuj kunlaborantoj de ET, kiuj estis skribintaj tiujn artikolojn. Tiamaniere la kunlaborantoj de ET, ricevinte la tradukaĵojn de siaj artikoloj, povus plej bone pruvi por la vasta publiko la taŭgocion de internacia lingvo.

(A. K., Kaunas.)

85.

Trasdatante ET, oni foje rimarkas malgraŭ la multnacia verkantaro nur malmultegajn nekomprensiblojn, malmultajn malkorektojn. Tamen ni opinias, ke estas konsilinde, atentigi ankaŭ pri ĉi tiuj malmultaj neregulaĵoj, por ke neniu rilate la lingvon fariĝu pli kaj pli modela. Jen kelkaj novaj vortoj: 1. nano (ET 27, Legendo de l' Rejno, linio 84), ĉu speco de koboldoj? 2. violentaĵoj (ET 28, Letero el Itallujo), radikvorton violent- mi ne konas, en Esperanto, certe oni povus ĝin anstataŭi per kruc- aŭ artil-; 3. merkato (ET 30, Komercia Ĉambro de Olomouc, por Esp.), ŝajne tro rapida traduko, alie la tradukinto certe estus uzinta la laŭfundamentan komerc-.

Fine mi tute ne konsentas al la „opa“ vendado. „Op“ estas sufikso, kiu sen ĉemita nombro havas tute neŝancon; ĉar la ĉefo, la nombro, mankas. Se oni vendas ĉiam po tri ekzempleroj, estas triopa vendado, se oni vendas ĉiam po unu ekzemplero, estas unuopa vendado.

(Leono Funken.)

(Rim. de Red.: La vorto „nano“ estas trovobla en la vortaro de Christaller; ĝi devenas de latina „nanus“, „l“. — „Violenta“ ankaŭ devenas el latina lingvo; jam aliaj esp. ĵurnaloj ĝin uzis, sed eble ĝi estas nebezona. — „Merkato“ jam estus uzata interalie de Internacia Komercia Revuo kaj de „Esperanto“ de UEA. — La vendado de ET ĉe kioskoj ne okazas unuope, sed ĵen unuope, ĵen duope, ĵen triope. Do ni ne opinias, ke la apliko de la simpla sufikso sen nombro en nia kazo estas malĝusta.)

## Recenzoj.

### LIBROJ.

LA FONTO DE LA BLANKPIEDILINO, de Perko Slavejkov, tradukita de At. D. Ajanasov. 10:14 cm, 16 pĝ. kaj kovrililo. Prezo 0,30 fr. flk. Mendelba ĉe Centra Librero „Esperanto“, Sofio (Bulg.). Kolekto Bulgara Bukedo n-ro 1.

Jen libreto, kiu ne plaĉas. Papero kaj aranĝo malbonaj. La poemo — en la originala teksto eble bonega — estas tute senrite tradukita. Kelkaj preseraroj kaj strangaĵoj. Kiel elparoli: akv' freŝa? Per tiu ĉi kajereto la Bulgara Bukedo certe ne bone enkondukiga. Esperibla sekvo: intaj floroj estos pli plaĉaj. (R-ano.)

### GAZETOJ.

AMERIKA ESPERANTISTO. Aprilo. Pilgrim-Número. Kvankam certe interesa estas artikolo pri la „prapatril pilgrimo“, oni tamen sin demandas mirante, ĉu en tuta Ameriko ne estas esp. movado, pri kiu valoras ion raportoj.

BELGA ESPERANTISTO. Marto-aprilo. Kronika kaj literatura parto. Bedaŭrinde enŝovigis sur paĝoj 60 kaj 61 aĉaĵo tute ne inda por esp. gazeto.

KRISTANA ESPERO. Marto-aprilo. 32-paĝa kajero. Interesaj artikoloj. Aldono: Dia Regno. LA MARTO. Majo. Ilustr. artikoloj pri Eger, Franzensbad kaj Saaz.

## Abonoj al ET.

Ni liveras al ne-germanaj landoj: 50 n-rojn por 80 germ. mk., 10 ŝil., 10 sv. flk., 20 fr. flk., 5 hol. guld., 2 dolaro aŭ 25 liroj (lirojn ni akceptas nur el Italio); 25 n-rojn por duona prezo.

Al Germanio, Baltiko kaj Balkano 10 n-rojn por 10 gmk. — Al Polio 25 n-rojn por 150 mk., al Aŭstrio kaj Hungario 10 n-rojn por 30 kronoj, al Ĉeĥoslovakio 15 n-rojn por 20 kr.

Oni pagu per monbiletoj aŭ bankĉekoj. Germanoj pagu ĝis fino de junio al poŝtĉek-konto Köln 70863, Teo Jung, Horrem; post 1. julio ili abonu per la poŝto.

Negermanoj el bonvalutaj landoj ne pagu per poŝtavalizoj, ĉar la poŝto donas parte nur 2/3 de la kurza valoro, kaŭzante al ni eviteblan perdon.

### Niaj Abonejoj.

AŬSTRIO. Esp.-Societo por Stirio, Graz, Schönaugasse 6. BULGARIO. Georgi Hr. Gaŝevski, Centra Librero „Esperanto“, Bul. Marie Luiza 46, Sofio.

ĈEĤOSLOVAKIO. Otto Sklenčka, Hradec Kralové. Prof. J. Süsler, Saaz 687.

ESTONIO. Helmi Drezén, sekretario de Est. Esp. Unuiĝo „Espero“, Rüttili t. 6, Tallinn.

FINNLANDO. O.Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.

GERMANIO. Postscheckkonto Köln 70863, Teo Jung, Horrem Bez. Köln.

HUNGARIO. Paŭlo Balkanyi, Budapest, Hajos-utca 15, II, 2.

LITOVIO. Paŭlo Medem, Kaunas, Smeliu g-ve 12.

POLIO. Adolfo Oberrotman, Warszawa, Krak. Przedm. 10.

PORTUGALIO. Agencia Esperantista, Silva & Carreira, 104, Apartado, Lisboa.

# ARGENTINIO.

Reprezentado de ĉiusepacaj komercaĵoj, facile vendebaj en Sudameriko, nur de kapablaj firmoj unuaklasaj, akceptas eksoficisto teknika de la Argentinia Terkultura Ministerio. Konatiĝis bonege dum 7 jaroj kun la fiaj ekonomiaj cirkonstancoj. Post kelkmonata restado ĉi tie reveturos Argentinon, trapaŝante okcident- kaj nordokcident-eŭropajn landojn. Absolutaj moralaj-materiaj garantioj. Adreso ĝis la XIII-a: L. Keley, Szászsebes (Sebesul Sasesc), Transilvanio, Rumanio; poste: Keley-Martelli, c. Caseros 528, Buenos-Aires, Argentinio.

## KOMERCISTA ESPERANTO-GRUPO

Freiburg i. Br., Katharinenstr. 14

peras ĉiusepacajn negocojn. — Rilatoj al gravaj germanaj firmoj. Perado senkoste. Uzu niajn servojn!

## Intereseĝa Libro!

Aĉetu ĉe N. Jäger, Pisa (Italio), Via Vitt. Em. 17, la faman novegan libron

**La Historio de Kristo**  
(La Storia di Cristo)

de l' mondkonata verkisto G. Papini, kies apero tiom impresis la tutmondajn kulturondojn.

Prezo it. lir. 25.— aŭ sv. flk. 7.— aŭ samvaloron en naciaj monbiletoj.

Al UEA-anoj kaj al aĉetantoj de almenaŭ 3 ekz. rabaton de 10%.

## Anoncetoj.

(Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj kostas por dufoja enpro la samon kiel kvin numeroj de ET. La monon ni deprenas de la konto de la abonantoj. Kvinfoja enpro kostas la duoblon.)

MAŜINSEGILO KAJ LOKOMOBILLO. Mi serĉas aĉeti de germana maŝinfabro unu maŝinseglon (gateron) malpezan kun 12 seĝiloj (lasta modela) kune kun unu vapormaŝino (lokomobilo), ankaŭ malpeza, 16 ĉevalfortoj. — Posedantoj sin turnu al Hristo D. Sabev, selo Stolat-Sevlevsko, Bulgario.

LIBROJ. Sendu al mi almenaŭ 50–100 nedifektajn uzitajn poŝtmarkojn de via lando, kaj mi sendos interesan bonajn esp. librojn. Aŭ sendu vian adreson, kaj mi sendos definitivan proponon. — C. Goldsmith, 5, Cheverton Avenue, Withersa, Yorks, Anglio.

DOMETOJN (ingojn) de vivantaj surlandaj kaj endolĉakvaj MOLLUSKOJ (limakoj kaj konkoj) el ĉiuj landoj deziras ricevi (interŝanĝe je iuj aln dezirataj objektoj aŭ esperantoj) zoologisto d-ro R. Wohlsat, 22, Lübeckerhor, Hamburg (Germ.), Mineralogia-Geologia Instituto.

### Korespondado kaj Interŝanĝo.

(Dufoja enpro kostas la samon kiel tri numeroj de ET. La monon ni deprenas de la konto de la abonantoj. Kvinfoja enpro kostas la duoblon.)

Robert I. Clegg, 225 North Michigan Avenue, Chicago, Illinois, Usono, Ameriko, deziras korespondi kun ĉiulandaj framasonoj, ne framasoninoj.

Mi volas korespondadon per ilustr. kolor. poŝtkartoj. — Clarence L. Thomas, 2864 N. Taylor Str., Philadelphia, Pa., Usono, Ameriko.

H. Haenen, administristo de l' minlernejo, Heerlen (Hol.), deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun superslezianoj, rusoj, polojanoj, ĉeĥoslovakianoj, finnoj kaj ekster-eŭropanoj.

Izaak Spiro, Białystok, Pol., Poŝtkesto 61, deziras korespondi kun glermanoj, ankaŭ vendi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn, papermonojn kaj monbiletojn.

Kiu deziras aĉeti malkare poŝtmarkojn de „Flume“, Jugoslavio, Litovio kaj Polio, aŭ interŝanĝi poŝtmarkojn kaj papermonojn, bonvolu skribi al s-ro L. Galinski, Sobieskiego 5, Białystok, Polio.

Kiu bezonas bonajn polajn poŝtmarkojn — kaj papermonojn, ili povas interŝanĝi poŝtmarkojn kaj papermonojn kun mi. Mi korespondas ankaŭ pri matematika kaj naturscienco. — Lazaro Grosberg, Białystok (Pol.), ul. Jurowiecka 8.

Aug. Čermák, profesoro en Usti nad Orlicí, Ĉeĥoslovakio, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj lerojn kun fremdlandaj samideanoj, ĉiam respondos.

Jiri Frankenberg, del. UEA, Bytčica u Zlín, Slovakio, interŝanĝas poŝtmarkojn kaj lerojn kun turistoj de la tuta mondo.

S-ro J. Oulehla, adm. oficeito en Skrivany apud Novy Bydžov (Boĥemio) deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun Rusio, Ukrainio, Polio, Estonio, Litovio, Letonio, Danio, Islando, ĉiujn germanajn plebisitajn, Würtemberg, de ordinare ĝis pli altaj valoroj, po 1 ĝis 10 de ĉiu speco laŭ katalogo Michel 1920.

Prof. Sauerborn, Köln, Siebengebirgs-Allee 82, deziras interŝanĝi stampitajn kaj nestampitajn poŝtmarkojn kontraŭ samombraj germanaj poŝtmarkoj kun samideanoj en ĉiuj landoj.

S-ro Karl Thumm, Vilbel i. H., Germanio, Frankfurterstr. 55, deziras korespondi kun la tuta mondo per il. poŝtkartoj kaj lerojn.

Walter Strauss, Hohenstein, 88, Breslau (Germ.), deziras korespondi kun samideanoj en la tuta mondo per ilustritaj poŝtkartoj; respondos tuj.

Korespondadon per poŝtkartoj ilustr. aŭ lerojn kun samideanoj el ĉiuj landoj, precipe kun fruŝilono, deziras s-ro Ludwig Goppel, Horrem, Bez. Köln (Germ.), Lüdendorferstr. 25. Ĉiuj respondos.

Korespondadon per poŝtkartoj ilustr. aŭ lerojn kun samideanoj el ĉiuj landoj, precipe kun fruŝilono, deziras s-ro Michael Wieland, Horrem, Bez. Köln (Germ.), Waldweg 21. Ĉiuj respondos.

## O. Sklenčka, Delegito de UEA, Hradec Kralové

Ĉeĥoslovakio

peras kaj prizorgas ĉiusepacajn aferojn kaj rilatojn: komercajn, informajn, interesajn ktp.

inter fremdlando kaj Ĉeĥoslovakio.

Bonvolu uzi miajn fidindajn servojn!

## Centrifugaj Pumpiloj

Vapor-Turbinoj, Vapor-Kaldronoj, Vapor-Maŝinoj, Tubo-Kondukilaroj, Leviloj, Transportiloj, Maŝinoj por Sukerfabrikejoj, Reservejoj, Movigilaro, Fandajo, Kradostangoj

estas fabrikataj de

## Fratoj Stork & K-io Hengelo (O), Nederlando.

Fabriko kun pli ol 2000 laboristoj. Esperanto korespondata.

Nur petoj de seriozaj firmoj estas konsiderataj.

## Stampilojn



liveras

Rob. Pfennigwerth, Hirschfelde, Saks., Germanio.

## Pilatelistoj! Novaĵo!

Jus aperintaj konstituciaj polaj poŝtmarkoj, belega eldono, same 50 diversaj antikvaj maloftaj poŝtmark-kompletoj da diversspecaj polaj; same ukrainaj, Petlura, rusaj jubileaj Romanoff, de generalo Judenitŝ, kontraŭ-batalanto de Bolŝevikoj, rusaj sovjetaj, kaj aperintaj poŝtmarkoj de Litva Srod-kova, de generalo Zeligovski. Ankaŭ malnovaj moneroj. Liverado al seriozaj pograndaj filatelistoj. La pago per respond-kuponoj, bankbiletoj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj.

Adolfo Oberrotman, Varsovio, Krak-Prz. 10.

## Samideanoj!

Ĉu vi vidis jam urbegon kun grandaj palacoj kaj vilaĝaj stratoj unu apud la alia sur la bordo de granda riverego inter ĉarmaj montoj?

Ĉu vi vidis jam urbegon, kie kunigas la moviĝemo kaj sensaciemo de l' okcidento kun la transkvileco kaj konservativismo de l' oriento?

Ĉu vi vidis jam urbegon, kie kunigas la plej belaj virinoj kaj knabinoj de la mondo el la rasoj kunmiksita de hungaroj, germanoj, slavoj kaj judoj?

## Budapest

estas laŭ diro de la vojaĝantoj urbege belega kiel Napoli, Konstantinopolo kaj aliaj famaj urboj.

Budapest estas la pordego inter oriento kaj okcidento.

Budapest gastigos la esperantistojn dum aŭgusto 1921 per poŝtkongresaj festoj.

## Venu el Praha al Budapest!

Anoncu vin al s-ano A. Laquer, Budapest VII, Kiraly u. 57.

Provizora kotizajo: el okcidentaj landoj tri monuoj (10 mk. por germanoj).